Kopir por Malmgren

SVENSKA ESPERANTO-FÖRBUNDET — Protokolo 7/1945

SVEDA ESPERANTO-FEDERACIO
TEGELBACKEN, STOCKHOLM
TEL. 20 00 43 - POSTGIRO 20 12

Protokolo pri la estrarkunveno de SEF en la sekretariejo, Tegelbacken, Stockholm, la 21-5-1945. Ĉeestis: MALMGREN, STRÖNNE, AHLM, ÅBERG, HÄSTFELT, OLSSON kaj HÅKANSSON.

§ 1. Malmgren malfermis la kunvenon bonvensalutante la novajn estraranojn Ahlm sekretario, Strönne vicprezidanto kaj Åberg vicsekretario. Strönne bonvenisalutis la novan prezidanton de la estraro Malmgren.

§ 2. INVENTARIAĴOJ Malmgren prezentis unue la sekretariejon al la novelektitoj menciante, ke inter la inventariaĵoj havigitaj 1933 -1935 kelkaj mebloj apartenas al li kaj ke unu skribmaŝino kaj libroŝranko estas proprajo de IEL. Ĝis nun la Instituto kaj Turistkomisiono rajtis disponi la inventariaĵojn certagrade kaj kontraŭ tio neniu rimarkis, nur estis substrekate la antaŭrajton de SEF rilate la uzadon.

§ 3. PROPONOJ AL LA JARKUNVENO La prezidanto sciigis pri la diversaj fondaĵoj kaj ĝisnunaj monkolektadoj. Sekvis diskuto pri la proponita "Amikaro de Esperanto". Åberg estis elektata pretigi detalan planon pri la organizo konsiderante la diversajn eblecojn havigi ekonomian subtenon i.a. pere de propone 60:- kr.-garantiantoj kaj kolektivaj aliĝoj de organizaĵoj simpatiantaj kun nia movado. Dum la aŭtuno ĉijare estu alvoko pri ekonomia subteno de nia movado sendota al organizaĵoj kaj unuopuloj. La estraro decidis samtempe ke la sola monkolektado inter la esperantistoj ĉi-aŭtuno koncernu la 60:- kr.-kotizojn kaj ke ĝi okazu en la nomo de Amikaro de Esp. propone kun la subrubriko "La cent" aŭ simila distingita nomo.

§ 4. PROPAGANDO Strönne ricevis la taskon pretigi propagandfolion en sveda lingvo pri la avantaĝoj de Esperanto. Ĉi estu ricevebla senkoste de SEF. Estis ankaŭ decido peti Kld. Societo pri enmeto de tia propagandfolio en la gazeton unufoje kvaronjare kaj se eble kun ĉiufoje nova enhavo. Koncerne la gazeton la estraro substrekis la deziron ke ĝi estu redaktata nur en esperanto kaj ke ĝia nomo en kunligo kun tio estu ŝanĝata al SVEDA ESPERANTO GAZETO - La Espero anstataŭ la nuna sveda nomo. Ĉi tio nur por ke ĝi fariĝu pli valora internacie kaj tiel ankaŭ ricevi pli da abonantoj.
Esperanto-semajno. La sekretario proponis ke SEF instigu la klubojn en la tuta lando samtempe, propone 16-23 septembro, okazigu intensan propagandon per afiŝoj, flugfolioj, gazetartikoloj k.t.p. por kurso aŭ se kursgvidanto mankas por la koresponda kurso. Estus bone se SEF tian povus anonci pri esperanto en la stockholmaj gazetoj kaj ankaŭ en kelkaj el la pli grandaj semajnaj revuoj. Estis decido prilabori la proponon kaj elsendi instrukciojn kaj kelkajn gazetartikolojn al la klubo j.

§ 5. PROGRAMARKIVO Laŭ antaŭe farita decido Håkansson kompilu la proponojn por la programarkivo. La estraro decidis ke li rilate la eldonon de ĝi kunlaboru kun la redaktoro de la antaŭa numero, Alexandersson kaj ke la nova numero estu preta plej malfrue la 1-an de augusto ĉijare.

§ 6. DISDONTRIGO DE LABORO Estis principa substreko de la neceso decentrigi tian laboron kiel ekz. multobligadon kaj distribuadon de cirkuleroj.

§ 7. FIRMOSUBSKRIBANTO Por la firmo de Sveda Esperanto Federacio subskribas ĝia kasisto Bengt Skantz, Stockholm. Tiu ĉi paragrafo estis tuj ĝustigata.

Ĝustigas:

E. Malmgren